

La Espero

SVENSKA ESPERANTOTIDNINGEN

NOVEMBRO 1979
67-A JARKOLEKTO

6

ISSN 0014-0694
FONDITA EN 1913

Stockholm nästa


Det håller på att bli allt mindre tid kvar till nästa års internationella kongress, som kommer att äga rum i Stockholm. Förarbetet, som påbörjats för över ett år sedan har övergått i detaljplanering och tempot hos medlemmarna i kongresskommittén har ökat, kanske också blodtrycket. För bara några veckor sedan hördes en av dem säga: «Herregud, det är bara tio månader kvar!»

Med detta nummer av tidningen medföljer en anmälningsblankett och på sista sidan en förklaring, hur man använder den. Förklaringen är mest för alla dem som inte har för vana att besöka internationella esperantokongresser. Man räknar med flera hundra svenskar utöver det normala 100 — 150.

Vad kan man säga om nästa års kongress, som inte redan är känt?

Att det blir i viss mån en anorlunda kongress. Invigningen kommer att följa ett nytt mönster och kommer inte att vara längre än två timmar (mot över sex i Luzern!). Man planerar en auktion av olika esperantorarteter, t ex gamla böcker och tidskrifter, brevmärken, brev från kända esperantister, foton osv. Behållningen är tänkt att gå till esperantorörelser i tredje världen — så titta igenom dina lådor och föreslå, vad du tycker är av värde.

UEAs styrelse har beslutat, att «Diskriminering» kommer att vara kongresstemat. Man vill diskutera, vad diskriminering beror på och vad som finns gemensamt mellan olika diskrimineringar, t ex den som beror



på rasolikheter, på kön, på språk.

Många av programpunkterna kommer att vara helt traditionsenliga, förstås. Olika mindre sammanslutningar kommer att anordna sina möten, Sommaruniversitetet kommer att hålla ett tiotal föredrag, Komitato kommer att diskutera UEAs angelägenheter och välja en ny styrelse och ny ordförande. Som bekant tänker Humphrey Tonkin lämna ordförandeskapet nästa år (men stannar kvar i styrelsen, om han blir omvald).

Utflyktsprogrammet är i stort klart: det blir olika korta turer inom Stockholm, tre heldagsturer (en till Uppsala, en till Mariefred och Gripsholm, och en genom skärgården).

Efterkongressarrangemangen blir tre: semestervecka på Gotland med olika turer runt ön, vandring i Tännadalen, vilovecka med självhushåll i Dalarna — så nog ska man kunna välja något passande. Även i prishänseende blir det en stor spridning.

Ungdomarna kommer att ha sin kongress i Rauma i Finland och vi återkommer till den senare. För mindre barn, upp till 13 år, planeras en egen barnkongress i Röda korsets barnby i Västerhaninge, strax söder om Stockholm.

För att göra reklam för kongressen har kongresskommittén gett ut vackra brevmärken, men det känner du till redan. Vad du inte vet är, att det finns T-tröjor med kongressmärket också. Dessa finns att få hos SEF, som tagit fram dem. Se inuti tidningen vad som står där om dem.

La Espero

Organ för Svenska Esperantoförbundet
Adress: Box 4009,
122 04 Stockholm-Enskede
Ansvarig utgivare:
Bertil Åkerberg
Redaktör: Franko Luin,
Myggdalsvägen 123,
135 42 Tyresö
Telefon hem: 08 - 712 82 91
I redaktionen:
Sven Alexandersson,
Åke Blomberg,
Anita Lindblom
Prenumeration: 40 kronor
per år, postgiro 20 12 - 3,
Esperantoförbundet
Tidningen utkommer med
8 nummer per år: i februari,
mars, april, juni, september,
oktober, november och
december
Manusstopp: den 10, måna-
den före utgivningsmånaden
Fotosats: Esperantoförbundet
Tryck: Sturetryckeriet AB,
Stockholm 1979

Esperantoförbundet

Postadress: Box 4009,
122 04 Stockholm-Enskede
Besöksadress: Hågervägen 31
(T-station Tällkrogen)
Telefon: 08 - 48 99 76
Förbundets expedition har
öppet tisdagar kl. 18 — 20
Postgiro: 20 12 - 3
Medlemsavgift: direkt-
ansluten medlem 50 kronor,
ungdomsmedlem under 26 år
25 kronor, familjemedlem
(utan tidning) 15 kronor
Prenumerationsavgift för
La Espero och *Esperantonytt*
ingår i medlemsavgiften.
Medlemmar under 30 år får
dessutom ungdomsförbundet
SEJUs blad *ktp*.

Esperantoförlaget

Postadress:
Fack, 20042 Malmö
Besöksadress:
Möllevångsgatan 20 B
Öppettider: 1 sept — 15 maj:
onsdagar kl. 10 — 11,
torsdagar kl. 17 — 18
Skriftliga beställningar
expedieras hela året, även
under sommaren
Telefon: 040 - 12 20 29
Postgiro: 578 - 5
Expedition:
Anna-Greta Strönne
Medhjälpare: Wivi Nilsson
Styrelsens ordförande:
Åke Blomberg

När vi hundra i år i Klubo Cent?

Det har varit lite glest mellan olika nummer av *La Espero*, därför har även olika slags information fått vänta lite för länge, t ex hur det står till med årets medlemskap i **Klubo Cent**.

Här nedan kommer i alla fall listan över alla som blivit «medlemmar» under kvartal 2 och 3 i år: Hj. Örtenblad, Ljungaverk Ruth Gullberg, Grycksbo Jan Strönne, Malmö Helsingborgs Esperantoförening Märtha Andréasson, H. Kärra Runo Stridell, Borensberg Karl Axelsson, Huddinge Fritz Ström, Kumla Hildur Södergren, Borlänge Britta Lindeberg, Malmö Leif Holmlund, Skellefteå Henry Almar, Uddevalla Henrik Karlsson, Kisa Karl Gustavsson, Bergvik David Sandström, Malmö Estrid Lind, Krylbo Kerstin Alexandersson, Enskede Tage Goldheim, Kumla Britta Rehm, Göteborg

Från några av dessa har bidrag kommit två gånger.

Som du vet, används de medel som kommer till SEF genom **Klubo Cent** för att bekosta särskilda projekt, som förbundet inte har råd med normalt. I år, dvs i vinter, kommer de att användas för en beslutad annonskampanj, därför behövs just nu många fler «medlemmar». Om du glömt, hur man blir «medlem», så kommer här en kort repetition av medlemsreglerna:

Du betalar 100 kronor till pg 20 12-3, Sv. Esperantoförbundet, och anger på talongen **Klubo Cent**. Det är allt. Om du vill hjälpa till att värva «medlemmar» till denna exklusiva klubb, kan SEFs expedition skicka dig förtryckta inbetalningskort. Du behöver bara ringa dit en tisdagskväll eller skriva två rader.

T-tröjor för Stockholms UK

De dök upp redan i Luzern och mot slutet av kongressen såg man fler och fler bära dem. Det handlar om T-tröjor med reklamtryck för esperantokongressen i Stockholm.

Nu kan även du köpa dig en sådan tröja!

Det finns två olika kvaliteter



att välja emellan och tre storlekar (under nästa år fler). Storlekarna är de vanliga i sådana sammanhang: S som betyder liten, M som betyder mellanstor och L som betyder stor. Är du extra kraftig behöver du en XL; det är denna som kommer först nästa år.

Kvalitén märks främst på färgen: den mörkblå tröjan är av bättre kvalitet än den ljusblå. Trycket kommer bättre fram på den ljusare tröjan däremot.

Om du vill ha en sån tröja, vad skall du göra? Du beställer den hos SEF, genom att betala till postgiro 20 12-3, Sv. Esperantoförbundet. Varje mörkblå tröja kostar 35 kronor, varje ljusblå 30 kronor, oberoende av storlek. Till detta tillkommer 5 kronor för porto.

På talongen anger du t ex så här: «2 st mörkblå tröjor, storlek M». Du kan förstås också välja olika storlek, t ex «1 ljusblå tröja storlek L och en storlek M».

Malfrua rapporto pri Suda distrikto

Pro la iom neregula aperritmo de *La Espero* ĉijare kelkaj raportoj aperas tre tre malfrue. La jena kaj la posta estas iuj el ili, sed por multaj ili verŝajne tamen estos bonvenaj.

La Suda distrikto de SEF havis sian jarkunvenon en Helsingborg sub la gvidado de Olle Olsson, Lund. En la jarraporto oni povas legi pri vigla laboro en la diversaj kluboj de la distrikto. Ekspozicioj estis aranĝitaj en pluraj bibliotekoj, la kluboj de Malmö kaj Lund havis informajn vesperojn por ĉiuj interesitoj, kaj la klubo de Lund ankaŭ partoprenis en aranĝo dum la lernejoj sportferioj.

Kunlige kun la jarkunveno la

distrikto aranĝis semajnfina kurson. Prelegantoj estis Olle Olsson, kiu pritraktis gramatikajn malfacilaĵojn, Torsten Lundh, Malmö, kiu prelegis pri instrumentoj kaj diversaj helpiloj en la esperantoinstruado, kaj Roland Lindblom, kiu informis pri planado por estonta esperantolaboro en Svedio. Alia prelego de Roland Lindblom temis pri Kiamaniere argumenti por esperanto.

La partoprenantoj pritraktis la diversajn problemojn vekitaj dum la prelegoj en grupa laboro, raportis pri la rezultoj kaj pridiskutis ilin. Mi kredas, ke la ĉeestantoj ricevis novajn impulsojn por la esperantolaboro.

Lisbet Andreasson

Ankaŭ SLEA jarkunvenis

En bela majo (sabate la 19an) ni kolektiĝis en Esperantoskolan, Barnhusgatan, Stockholm, kie kafo kaj teo kun riĉaj buterpanoj estis servitaj. Poste la 40 partoprenantoj suriris la ŝipon Apollo III ĉe Stadsgården por veturi al Mariehamn. Gaja interkonatigo dum la supeo surŝipe. Folke (Rosén) ludis per «bandito».

Dimanĉe okazis la jarkunsido de SLEA. Folke enkondukis, Kurt Johansson, Malmö, prezidis, kaj Göte Landén, Huskvarna, protokolis. La franco Henri Masson salutis de SAT-Amikaro; mi salutis de SEF kaj transdonis simple binditan volumon de *Lingvo Internacia* 1898. Kelkaj kluboj ankaŭ salutis. La nova estraro nun konsistas el: Kurt Johansson (kiu tamen volonte eksiĝus), Signe Larsson, Corrie Lindkvist kaj Egon Göransson. Nova forto en Esperantoskolan estas Ivar Paulsson. Venontjare oni kongresos

en Huskvarna.

La partoprenantoj havis okazon studi la ĉarman urbeton Mariehamn antaŭ la reveturo al Stockholm.

Salex

Albert Liljemark subite forpasis

Unu el la pioniroj de esperanto en Gävle, Albert Liljemark, mortis 83-jara. Ĝis sia lasta tago li estis vigla kaj agema. Lia morto venis subite.

Li fariĝis esperantisto jam en la komenco de la jarcento kaj baldaŭ li estis entuziasma ano de la klubo de Gävle, tiu klubo, kiu tiam eldonis propran esperantogazeton, *La Espero*, ek de 1914 la oficiala organo de la sveda esperantomovado. Dum kelkaj periodoj Liljemark ankaŭ estis prezidanto de tiu klubo.

Mi renkontis lin unufoje en 1949 kaj mi tuj admiris lin kiel pioniron kaj kiel entuziasmulon. Sed tiam la Esperantosocieto en Gävle malgrandiĝis, kaj Liljemark kaj alia pioniro, la policisto A. K. Örn ĉiam rakontis al ni junaj pri la grandaj tempoj pasintaj.

Antaŭ kelkaj jaroj A. K. Örn mortis. Liljemark daŭre vigle laboris. Preskaŭ ĉiujn kunvenojn li ĉeestis. Ofte li povis rakonti pri novaj spertoj, pri novaj vojaĝoj eksterlandaj, kaj precipe pri esperantokongresoj, en kiuj li partoprenis. Sed kiel sufiĉis lia tempo, liaj fortoj?

Li estis homo kun multaj intereso. Li estis komunuma deputito kun pluraj komisionoj, i a kiel revizoro de la komunumo. Li ankaŭ estis vicjuĝisto en la urba tribunalo. Kiel rezerva oficiro li atingis la gradon de leŭtenanto kaj fariĝis membro de pluraj soldatkamaradaj organizoj. Laŭ metio li estis tabakvendisto kaj esekura reprezentanto, dum multaj jaroj ankaŭ prezidanto de la tabakvendista asocio de Gävle.

Unu el la lumigantoj forpasis. Forte vivanta kamarado foriris. Ĉu junaj generacioj kreos iun similan?

Folke Wejbro

Pruntu librojn el Umeå!

En la urba biblioteko de Umeå estas stoko de ĉirkaŭ 60 libroj en esperanto. Por plifaciligi nian laboron je lkontakto kun la biblioteko estas grave, ke la libroj estu pruntataj, kiel jam akcentis Åke Blomberg en la antaŭa numero de *La Espero*. Ĉikaze ekzistas bona ebleco por la

amikoj en la tuta lando ekhavi legeblan literaturon. Se vi skribos al Ivar Nilsson, Klövernägen 26, 902 49 Umeå, kaj petos liston de la libroj, li tuj sendos ĝin al vi; vi aldonu afrankitan kaj adresitan koverton en vian leteron. Poste vi povos iri al via biblioteko peti la librojn laŭ speciala mendilo, kun indiko, ke la dezirata libro estas trovebla en la biblioteko de Umeå.

Ivar Nilsson atendas multe da leteroj.

«Boksa» adreso ankaŭ por Eldona

Ĉar la poŝta administracio decidis forigi ĉiujn «fack»-adresojn (kio igis jam SEF ŝanĝi sian antaŭ unu jaro) ankaŭ Eldona Societo Esperanto devas ŝanĝi sian delongan adreson. Ek de nun vi adresigu ĉiujn poŝtajojn al **Box 7502, 200 42 Malmö**.

Jen raporto pri nova kurso

Post mia partopreno en la kurso por gvidantoj en Jönköping, antaŭ unu jaro, mi petis la rektoron en la centra lernejo en Tranemo, ke li aranĝu al mi eblecon fari prelegon por ĉiuj instruistoj en nia komunumo.

Li tuj promesis al mi, ke li aranĝos tian programon dum t n «instruista tago» en la aŭtuno 1979.

La kvinan de oktobro mi havis okazon informi ĉirkaŭ 60 instruistojn el la alta kaj meza stadioj. Samtempe mi havis malgrandan ekspozicion de esperanta literaturo. Post la informado mi faris enketon, ĉu la instruistoj estas favoraj al esperanto. Ĝojige montriĝis, ke la plimulto de tiuj, kiuj skribe respondis, deklaris sin favoraj al esperanto, kvankam ili ĝuste nun ne havas tempon okupiĝi pri nia lingvo.

Tri instruistoj anoncis sin pretaj lerni esperanton. Mi nun havas kurson kun 7 komencantoj.

En la unua leciono mi substrekis, ke esperanto estas planlingvo, konstruista el eble la plej bone konataj vortelementoj de la internacia vorttrezoro. Mi ankaŭ komparis kun la «artefaritaj» lingvoj svahila, hindustana kaj jidiŝa, kiuj lingvoj ja sukcesis.

Esperanto havas ankoraŭ pli altan kvaliton. Kvankam la laborkampo de esperanto estas multe pli granda ol la laborkampoj de la menciitaj lingvoj, mi kredas, ke esperanto sukcesos.

Curt Olsson

HODIAŬ

Jen kelkaj ciferoj pri «svedaj» infanlibroj

Ni esperantistoj scias, ke du el tri libroj, kiuj tradukiĝas en la svedan, tradukiĝas el la angla lingvo. Kaj ni ankaŭ scias, kial ni troviĝas en tiu unuflanka kultura dependeco: la svedoj ne komprenas aliajn lingvojn, ne kapablas pliriĉigi sian kulturon per alilingvaj fontoj.

Unu plian pruvon pri tio alportas raporto eldonita de la Sekretariato pri nordlanda kultura kunlaboro, kun la titolo Børnelitteratur i Norden. En ĝi prezentiĝas la situacio sur tiu kampo en la diversaj landoj de la Nordlanda Konsilio.*

Ni nur rigardu la raporton pri Svedio.

Ĉirkaŭ 700—800 junularaj libroj aperas ĉiujare en Svedio. El ili 55% estas tradukaĵoj. El la tradukita literaturo 70% estas tradukaĵoj el la angla-usona, 11% el la dana kaj po 6,5% el la franca kaj germana lingvoj. La malproporcio angla: aliaj lingvoj estas evidentega. Iom surprizas la alta pocentaĵo de dandevenaj libroj, sed tio estas pli facile komprenebla, se oni scias, ke unu el la pli grandaj bildlibroeldonejoj (Carlsen/if) estas dane posedata.

Sed reen al la anglaj libroj. Ĉu vere ilia kvalito, enhavo, ilustraĵoj, estas tiel elstaraj, ke oni devas ignori alilingvajn infanlibrojn?

Nu, bone, eble ne gravas, el kiuj lingvoj la libroj tradukiĝas. Ili ja estas en la sveda. Sed la personoj kaj lokoj en la libroj havas anglajn nomojn, la kutimoj estas anglaj kaj usonaj. Tiuj nomoj kaj lokoj baldaŭ sonos kiel se ili estus niaj propraj kaj ni aŭtomate sentos simpatian al ili. La aliaj nomoj kaj lokoj, kontraŭe, restos foraj kaj nekompreneblaj.

Tre frue firmiĝas ŝatoj kaj malŝatoj en la vivo, kaj estas bezonata multega edukado por ŝanĝi ilin. Sed se krome la tuta eduka sistemo estas tia, ke ĝi nur plifortigas tiujn ŝatojn, kiel kontraŭlabori ilin?

Unu el la celoj de la sveda socio estas atingi internacian interkompreniĝon kaj multrilate oni sukcesis en tio. Sed tuj, kiam oni komencas iel mezuri la «kvaliton» de tiu interkompreniĝo, montriĝas, kiel unuflanka ĝi estas kaj kiel multe ĝi neglektas la kulturojn ekster la angla/usona.

Franko Luin

* Havebla senpage ĉe Sekretariatet for nordisk kulturelt samarbejde, Snaregade 10, DK-1205 København K.



Aŭtuna kanto

Longis, tute senrenkonta, mia hejmerir',
la vespero estis nigra kaj frida.
Konsolu min nun iom, ĉar mi lacas pro la ir'
kaj mi sentas min sola, timida.
Nur nun mi vidis, kiel profundas la malhel',
mi rimarkis nun kiom farendas.
Da diroj kaj da agoj ja plenas mia cel',
sed daŭre ankoraŭ ĉio atendas.

Refreno Venu, karulo, rapide min amu,
fadas la tagoj minut' post minut'.
Prenu kandelon, alvenas la nokto,
pasis la lasta somersalut'.

Vortoj: Tove Jansson
Muziko: Erna Tauro
Traduko: Franko Luin

Mi ŝatus trovi ion, kion ni forgesis jam,
kun via helpo mi ĝin eble trovus.
Somero ĉiam pasas rapide kiel flam':
nura signo, ke ion ni povus.
Vi eble venos antaŭ ol bluos la vesper',
antaŭ ol jam sekiĝis la plantoj.
Ni eble renkontiĝos kaj nia amesper'
igos florojn ree flori en kvantoj.

Nun ŝtormas la aŭtuno kaj forestas la somer',
ne plu indas pensadi nun kaj vagi.
Mi eble ne plu amas vin kun tiom da tener',
tamen pli ol vi povas imagi.
Ni vidas la lumturojn laŭ la aŭtuna bord'
kaj ni aŭdas la ondojn plaŭdadi.
Nur unu sola gravas: ĝi estas koragord'
kaj ke ni povu kune plu restadi.


Tuj ĝojo estas for

Nur unu sola roz' ĉe eterna roĵo
estas vivo, daŭras malĝojo,
tuj ĝojo estas for,
tro subite for.

Se pelas vin la sort' la malluman vojon,
trafos suno vin unu fojon,
tuj ĝojo estas for,
tro subite for.

En somerherbej' vi trovos unu kvarfolion nuran,
prenu ĝin,
kaj same unu nuran fojon trovos vi amikecon puran,
retenu ĝin,
aŭ ĝi restos nur memor',
ĝojo estas for,
tro subite for.

Vortoj: Povel Ramel
Muziko: Povel Ramel
Traduko: Franko Luin



Jen denove du paĝoj kun kelkaj tradukitaj kantoj – ekde Bellman kaj ĝis Thorstein Bergman kaj Tove Jansson. Ĉu vi eble ne konas la melodiojn? Ili estas facile troveblaj. »Ĉarmbrila nimfo« de Bellman nomiĝas »Glimmande nymf« kaj vi povas trovi la notojn por ĝi en »Fredmans epistlar«, eldonita de la eldonejo Prisma. Ĉiuj ceteraj kantoj estas troveblaj kun notoj en »60 visor om kärlek«. Iliaj svedaj titoloj estas »Höstvisan«, »Underbart är kort« kaj »Om du nånsin kommer fram till Sammarkand«. Bonan kantadon!

Se alvenos iam vi al Samarkand'

Kiam mi vekigis, suno sur min lumis,
tra fenestro malfermita venis vent'.
La somerodoroj tute min parfumis,
sur kuseno daŭre restis via sent'.
Ke al mi okazis tio, mi tuj sentis,
kio restis por ni du ĝis nun demand'.
Vi ekhavu ĉion, kio vin jam tentis,
se alvenos iam vi al Samarkand'.

La somero min ĉirkaŭis post eliro,
ĉio vivis plu, sed mankis la fervor'.
Mi ne vokis vin, ne mankis la deziro,
mi ja scias, ke vi estas longe for.
Eble mi esploris en la nokto klara,
sed vi iru pluen al la revolond',
trovu tiun, kiu estos al vi kara,
se alvenos iam vi al Samarkand'.

Birdoj kantas, burdoj zumas ĉi-ĉirkaŭe,
en la roso brilas plu la sunradi'.
Mi sopiras al vi eĉ pli ol adiaŭe;
ĉio via restas daŭre ĉi ĉe mi.
Tie ĉi vi estas, ĉio vin tuŝanta,
kvazaŭ papilio, floro sur girland',
ĉio bela restas, vi rev-iras lanta,
se alvenos iam vi al Samarkand'.

Vortoj: Thorstein Bergman
Muziko: Thorstein Bergman
Traduko: Franko Luin

Ĉarmbrila nimfo

Ĉarmbrila nimf', fulma rigardo,
estas haven' por mia am-ardo,
vana fervoro
nun ek al adoro
de Morfe', la sonĝo-di',
nur je lum' de lunradi'.

Pordo fermita. Fenestro samas.
Jam vian kapon ĉapo ornamas
kaj la peruk' sur ŝnur'
jam pendas de la mur'.
Ekdormu je muzikplezur',
ekdormu je muzikplezur'.

De fringo ĵus, ĵus Kajsa Lisa,
venis la kant' vesperon ĝisa.

Suno jam foras,
ĉielo jam oras,
estas la soleca hor'.

Nun mi pensas al amor'.

Pluvon kun vent' kaj tondro muĝa
sekvas la ark' brulfajre ruĝa
kun strioj de verdblu',
plenigas nin kun ĝu'
post la pluvega tondra sku',
post la pluvega tondra sku'.

Dormu, ho nimf'! Sonĝu en paco
kaj kun la sun' vekigu kun graco.

Ridon vi sendas,
la brakon etendas
al brakumo, al likvor',
jam vi pretas al amor'.

Mortas, ho vi! Ne, vi respiras.
Morto kaj viv' kaj amo kuniras.
Videblas la langvor',
sed en okul' fervor'.
Vi dormu nun ĝis la aŭror',
vi dormu nun ĝis la aŭror'.

Vortoj: Carl Michael Bellman
Muziko: Carl Michael Bellman
Traduko: Franko Luin

Det gäller att vinna lärarnas förtroende

Vi esperantister känner väl till hur svårt det är att nå ut med information om det språk, vars funktionsduglighet vi har så god erfarenhet av. Vi sprider informationscirkulär, skriver tidsningsartiklar, anordnar utställningar, håller föredrag och anordnar kurser. Men resultatet är inte tillfredsställande. Tillväxten i vårt förbund är skral.

Det är framför allt ungdomen vi vill och måste nå, och vi vill få in esperantoundervisning i skolan. Försöken att komma in via «fritt valt arbete» har hittills givit klen resultat. Detta kan delvis bero på lärarnas bristande kunskap om det

internationella språkets användbarhet och bildningsvärde. Ett hinder, som alltså i första hand bör undanröjas. Men hur?

I den mån SIA-skolan nu kommer att förverkligas, kommer ju också de fria organisationerna att få stora möjligheter att medverka inom skolan. Det ankommer då på esperantoklubbarna i respektive skoldistrikt att hålla sig framme och gripa denna efterlängtnade möjlighet.

Men, som sagt, det gäller i första hand att vinna lärarnas och skolmyndigheternas förtroende.

Varje lärare känner till de svårigheter, som möter i den

obligatoriska engelskundervisningen. En stor del av eleverna har t o m efter att ha passerat gymnasiet högst otillfredsställande kunskaper i engelska. Och många erkänner, att engelsktimmarna under deras skoltid varit en mardröm. Bortsett från att det naturligtvis finns elever, vilkas begåvning inte ligger på det språkliga planet, så nödgas man nog konstatera, att en stor del av skulden kan läggas på undervisningsmetoderna. Framför allt är ett så grundläggande moment som ordkunskap och ordbildning svårt försummat.

När man lär sig esperanto är ju just ordbildningen genom rotord med tillägg av suffix och prefix så överraskande rationell. Även i nationalspråken förekommer denna ordbildningsmetod oftare än vi vanligen tänker på.

En annan detalj, som för lite beaktas, är den rika förekomsten av klassiska ordstammar i moderna språk.

Ett omfattande studium av dessa moment har gjorts av fil. mag. Karl M. Blomkvist i Motala. Hans materiel är utomordentligt intressant och väl utarbetat och borde kunna bli en god brygga över till esperanto.

K. Blomkvist är också villig att under, exempelvis, en halv studiedag informera lärare om sitt studiemateriel.

Esperantoklubbarna skulle kunna utnyttja denna möjlighet genom att söka kontakt med rektorer för hög- och gymnasie-studier och föreslå att en halv studiedag vid terminens början ägnas åt ordbildning i svenska och engelska. Vi behöver begynnelvis inte ens nämna esperanto. Det kommer som en självklar konsekvens av mag. Blomkvists föreläsningar och övningar. Skriv upp att många lärare kommer att bli roat överraskade av vad de kommer att finna.

Jag tror att detta är en väg, som vi inte får lämna oprövd, och jag vill uppmana alla klubbar att snarast söka kontakt med fil. mag. Karl M. Blomkvist, Styvingevägen 8 B, 591 00 Motala, telefon 0141-50942.

Runo Stridell

Aŭskultado de radio estas ankaŭ ekzerco

Depost pluraj jaroj Jan-Olof Svensson el Tidaholm regule sekvas la radiajn dissendojn en esperanto. Kaj same regule li pretigas listojn de stacioj, kiuj estas aŭdeblaj en Svedio.

Ĉar okazas konstante ŝanĝoj en la dissendado (stacioj ŝanĝas la ondlongojn, la tempon, la longon de la dissendo), estas necese daŭre revizii tiujn listojn. Jan-Olof konstante faras tion. Lastatempe du okazajoj igis lin refari la liston: la ĉesigo de la dissendoj de Ibra Radio, pro tro malbona aŭdebleco en Svedio (do ne nur de la esperantaj programoj) kaj la decido de radio Pekino sendi siajn programojn ĉiun tagon.

Apud radio Varsovio, kiu sola ĝis nun havis ĉiutagajn dissendojn, la decido de Pekino estas tre bonvena inter la aŭskultantoj de esperantaj radiaj dissendoj. Relative nova stacio estas ankaŭ Lisbono, kiu estas aŭdebla dimanĉespere.

La stacioj en la ĉi-apuda tabelo ne estas la solaj, kiuj uzas esperanton. Ili estas tiuj, kiujn Jan-Olof, kaj do ankaŭ vi, povas kapti en Svedio.

Aŭskultado de radio estas bona ekzerco kompreni esperanton, speciale se vi loĝas longe for de iu klubo.

Tago kaj horo	Stacio	Ondlongo/frekvenco
Ĉiutage		
06.00 – 06.30	Varsovio	200/1503 75,85/3955 50,94/5995 48,90/6135 41,27/7270
16.30 – 16.55	Varsovio	48,90/6135 41,45/9540
21.00 – 21.25	Pekino	43,73/6860 31,98/9380
22.30 – 22.55	Varsovio	200/1503 75,85/3955 50,04/5995 49,22/6095 41,18/7285
Lunde		
19.00 – 19.10	Berno	75,28/3985 48,66/6165 31,46/9535
23.00 – 23.10	Berno	ondoj kiel je horo 19.00
Marde		
23.45 – 24.00	Zagrebo	262/proks. 1145
Ĵaŭde		
07.15 – 07.30	Vatikano	196/1530 41,38/7250 31,10/9645 25,61/11715
19.00 – 19.10	Berno	ondoj kiel lunde
23.00 – 23.10	Berno	ondoj kiel lunde
Sabate		
17.45 – 17.55	Vieno	48,74/6155 Ripetota dimanĉe
19.00 – 19.10	Berno	ondoj kiel lunde
23.00 – 23.10	Berno	ondoj kiel lunde
Dimanĉe		
06.45 – 06.55	Vieno	ondo kiel sabate. Ripeto
19.20 – 19.30	Lisbono	49,79/6025 30,80/9740 Ripetota
21.00 – 21.20	Romo	41,24/7275 41,15/7290 31,33/9575
21.05 – 21.15	Vatikano	196/1530 48,47/6190 41,38/7250 31,10/9645 25,63/11705 19,84/15120
21.50 – 22.00	Lisbono	ondoj kiel je 19.20. Ripeto
22.20 – 22.30	Lisbono	ondoj kiel je 19.20. Ripeto
22.50 – 23.00	Lisbono	ondoj kiel je 19.20. Ripeto
23.20 – 23.30	Lisbono	ondoj kiel je 19.20. Ripeto

5 POR 10

Kvin folioj por dek kronoj. Kvindek glumarkoj. Pri la venontjara Universala Kongreso en Stockholmo. Tri koloraj. Aĉetu multajn. Uzu ilin sur ĉiuj viaj poŝtaĵoj. Mendu per pago al la poŝtĝiro 4 31 79 92-8, 65a Universala Kongreso de Esperanto.

Post sepdek jaroj Einar ekfamigās


La nomo de Einar Håkansson eble malmulton aŭ nenion diras al vi. Sed du libroj jam aperis pri li kaj la 20an de oktobro prezentigis teatraĵo en Södertälje, en kiu Einar Håkansson estas la ĉefpersono.

Ke vi ne konas tiun nomon ne estas strange. Einar Håkansson mortis en 1907, 24 jarojn aĝa. Pli konata al vi estas eble

70 jaroj? Ne pro esperanto, eĉ se Per Holmer en sia biografio skribas, ke la interesiĝo de Einar pri esperanto estis tre profunda.

KIU ESTIS TIU EINAR HÅKANSSON?

La verkisto Per Holmer donas la jenan koncizan bildon de la vivo de Einar Håkansson:



lia frato Eskil Håkansson, multjara esperantisto.

Sed ankaŭ Einar estis esperantisto, tiom interesita, ke li en 1906 eĉ veturis al Parizo por labori en la tiea «Presa Esperantista Societo».

70 jarojn post la morto komenciĝas la famo de Einar Håkansson. En 1977 aperis la unua libro pri li: «Typograf och fritänkare» de Per Holmer. La biografio ne estas tre ampleksa, nur cent paĝojn dika, sed dek el ĝiaj paĝoj estas dediĉitaj al Einar esperantisto.

Fine de oktobro ĉijare aperis antologio de verkoj de Einar Håkansson: «De fega förtryckta» ĉe la eldonejo Federativ. Tiun antologion redaktis Per Holmer, kiu ankaŭ estas la aŭtoro de la teatraĵo pri Einar Håkansson.

Ankaŭ la antologio pritraktas esperanton, nome en artikolo «Med esperanto i Paris», kiun Einar sendis al la gazeto Brand en kiu li kunlaboris.

Kial tiu subita intereso post

«Einar Håkansson naskiĝis en 1883 en Skärsåtra sur Lidingö apud Stokholmo, kie lia patro estis ĝardenisto. En 1898 li translokiĝis sola al Stokholmo, kie li eklaboris kiel tipografolernanto — profesio en kiu li restis, kun kelkaj mallongaj esceptoj, la tutan vivon.

En 1900 la tuta familio translokiĝis al Södertälje, kie la patro establis sin kiel ĝardenajkomercisto. Einar, la plej aĝa infano eklaboris ĉe la presejo de Södertelge Tidning.

Li fariĝis tre aktiva en la sindikata klubo de la söderteljaj tipografoj kaj estis baldaŭ korespondanto al Svensk Typograf-tidning.

Politike li aliĝis al la plej radikala kaj plej ekstrema falango de la laborista movado, la jun-socialistoj ĉirkaŭ Hinke Berggren. Li revivigis la malaktivan klubon en Södertälje kaj jam en 1902 ekskribis en Brand.

Unu lia plia intereso estis esperanto, la internacia lingvo, kiu havis fortan pozicion en la la-

borista movado je la komenco de la jarcento, ne malplej en Södertälje. Dum kelkaj monatoj en 1906 Håkansson laboris en esperantopresejo en Parizo.

Li estis vivoplena, klerigema kaj ege laborema — sed la sano ne sufiĉis al li. Aŭtune 1907 li mortis, 24 jarojn aĝa, pro pulma tuberkulozo, tre kutima profesia malsano inter tipografoj.

La sola libro, kiun Håkansson sukcesis eldoni estis «Draksådd - fem otrons artiklar» (1907).»

Pro la libro «Draksådd» li estis kondamnita al malliberejo (kaj la libro estis konfiskita), sed tiam Einar jam ne plu vivis. Tio eble estas la sola okazo, ke juĝejo kondamnis mortinton al malliberejo — konsciante pri lia morto.

Sed tiu ĉi artikolo ne intencas resumi la biografion de Per Holmer, kiu certe faris tre grandan laboron serĉante materialon pri

Einar Håkansson. Plej bone estas, se vi trovas la libron en la biblioteko (aŭ en librovendejo) kaj legas ĝin. La samo validas pri la antologio «De fega förtryckta». Ne estas certe, ke vi ŝatos ĉion, kion Einar verkis. Lia sola libro estis konfiskita, kiel menciite, kaj la kaŭzo estis, ke la artikoloj aŭ noveloj en la libroj estis akre kontraŭreligiaj, laŭ tiutempaj normoj.

Einar Håkansson verkis ankaŭ en esperanto. En Södertelge Tidning aperis lia poeziaĵo «Libereco!» kaj prozaĵo «La stelo nova». Tiam tiu gazeto estis ankaŭ organo por la «Societo Internacia de Esperantistoj», iaspeca antaŭulo de UEA laŭ «Enciklopedio de Esperanto».

Sed li ĉefe agis kiel raportisto. Li fariĝis korespondanto skandinavia al «Internacia Socia Revuo», kiu dediĉis longan artikolon al li je lia morto.

Franko Luin

Ett litet lager för alla smaker

ESPERANTOFÖRLAGET FÖRESLÅR

LA LAŬTA VEKHORLOĜO
— lätt, humoristisk ny läsebok 13,50

ASTERIKSO
— vem känner inte till Asterix? Nu på
esperanto, stor, färgglad, inbunden 33,—

LA FIERA MULTKOLORA KATETO
och BELA REVULO — vackra små
bilderböcker med lätt text, per styck 6,—

ĈU LI BREMSIS SUFIĈE?
— ny deckare av J. Valano 38,—

PRAKTIKA BILDVORTARO
— för kurser och vem som helst 44,50

ĈIU ĈIUN
— Theo Jungs memoarer, en diger volym 110,—

Alla priser med moms och porto.

Betala gärna i förskott vid beställning till postgiro 578-5. Om vårt lager tar slut skaffar vi så snart som möjligt påfyllnad. Beställ julböcker nu!

ESPERANTOFÖRLAGET
Box 7502, 200 42 Malmö

Så här anmäler du dig till världskongressen

Med detta nummer av *La Esperero* får du en bilaga som heter **Aliĝilo Stokholmo**. Det är anmälningsblanketten till nästa års internationella esperantokongress i Stockholm. Om du varit på någon kongress förr vet du vad du ska göra med den. Men om det blir första gången (och man tror att några hundra svenskar blir «förstagångare»), så är denna blankett helt ny för dig. Det kan t o m hända, att dina esperantokunskaper är lite ... rostiga.

I stället för att förklara rad för rad vad du ska skriva på blanketten, har vi fyllt i den med ett påhittat namn. Sätt dit dina personliga data i stället.

Några rader behöver lite förklaringar ändå:

Rutan som är märkt med **1** ska du alltid märka på det sätt som är utsatt här, alltså: **postgiro 14 74 29-5**. Det betyder, att du, samtidigt som du sänder anmälningsblanketten till fru Ester Andrén i Malmö, skickar din avgift till nämnda postgiro. Först när du satt in pengarna kommer din anmälan att räknas.

Punkt **2** kräver en längre förklaring. Som du ser i annonsen med kongressavgifter finns det 8 olika kategorier av avgifter. Du ska ange vilken kategori du tillhör. Om du är medlem i UEA eller mycket ung, får du rabatt. Om du är osäker, om du är medlem i UEA eller inte, kan du lätt avgöra det: får du UEAs årsbok, men ingen tidning? Då ska du betala enligt kategori **2**. Har du tidning och årsbok blir din avgift lägre och du betalar enligt kategori **3**.

Om du tillhör kategorierna **7** eller **8** är det nödvändigt med ett intyg, att du är heltidsstuderande eller synskadad. Det står något om detta på blankettens baksida.

Föräldrar, som tar med sig barn som är yngre än 13 år, behöver inte betala för dem. Men de ska likväl fylla i en anmälningsblankett.

Förutom den obligatoriska kongressavgiften finns det möjlighet att ge bidrag till olika fonder. Det gör du under de punkter som är markerade med **3**.

Adopta Kaso ger hjälp till enstaka esperantister, främst från tredje världen, som inte

själva kan bekosta närvaron på kongressen.

Blindula Kaso ger bidrag till de blindas kongress, som 1980 kommer att äga rum i anslutning till världskongressen.

Literatura Kaso är till för vinster som utdelas till vinnarna i s k *Belartaj Konkursoj*, dvs litterära tävlingar.

Adoptaj gepatroj lämnar bidrag till barnkongressen. Vi vill gärna, att du uppmärksammar just denna fond.

Som du ser, har «Eva Larsson» i exemplet tänkt på alla fonder. Så frikostig behöver man kanske inte vara — eller kanske det?

Eftersom make eller maka till en som är medlem i UEA också får rabatt, är det bra om du antecknar dennes namn — om ni planerar att vara på kongressen båda två. Det gör du vid punkt **4**. Men ni måste båda fylla i var sin blankett. Har ni bara en blankett går det utmärkt att ta

Avgifter t o m 31.12	
1 Icke medlem i UEA	380 skr
2 Medlem med årsbok	330 skr
3 Medlem med årsbok och «esperanto»	250 skr
4 Make/maka till (1)	260 skr
5 Make/maka till (2) eller (3)	230 skr
6 Ungdom t o m 20 år	120 skr
7 Heltidsstuderande t o m 30 år	190 skr
8 Synskadad	150 skr

Upplysningar hos s-ino Ester Andrén, Regementsgatan 27 D, 217 53 Malmö (tel. 040-65209).

Betalningar till postgiro 14 74 29-5, Sv. Esperantoförbundet, Specialkonto.

en kopia av den och fylla i kopian. Baksidan behöver du inte kopiera.

Läs för resten igenom baksidan också. Tabellen med avgifterna behöver du inte bry dig om. Avgifterna i svenska kronor finns i tabellen här intill. Vad du bör tänka på är att avgifterna höjs undan för undan (första gången den 1 januari 80) och att det kan löna sig att ordna betalningen före årets slut.

På baksidan kan du också läsa, att kongressavgiften inte täcker kostnader för logi, utflykter, bankett o dyl som man måste beställa separat så små-

ningom. Ungefär i februari kommer alla som anmält sig i tid att få den s k *Dua Bulteno* med beställningsblanketter.

Om du inte är medlem i UEA, tänk på att bli det inför kongressen. Du får en så kraftig rabatt, att din medlemskap blir nästan gratis. Skillnaden mellan kat. 1 och kat. 3 är 130 kronor. För 140 kronor blir du medlem i UEA. Bara en tia mer. Betalningen sker till samma postgiro-konto. Men för att få betala enligt kat. 3 måste du ha betalt UEA-avgiften senast i samband med kongressavgiftsinbetalningen.

När du fyllt i blanketten och läst igenom baksidan — vad gör du då?

Du fyller i en postgiroblankett med samma summa, som står på sid. 1 (plus eventuellt avgift till UEA), som du skickar till postgiro 14 74 29-5, Sv. Esperantoförbundet, Specialkonto. Anmälningsblanketten lägger du i ett kuvert, som du skickar till s-ino Ester Andrén, Regementsgatan 27 D, 217 53 Malmö.



Så är du alltså anmäld. Anmälan ger dig rätt att bevista kongressens alla fria arrangemang, dvs invigningen, mottagningen, alla föredrag, teaterföreställningar, musikarrangemang, vissa kurser.

Du får också den redan nämnda *Dua Bulteno* och desutom kongressboken, kongressmärket och andra kongressdokument.

Bilaga medföljer

ALIĜILO STOKHOLMO

Kongresnumero
Dato de ricevo

Por la administracio

65a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO
de la 2a ĝis la 9a de aŭgusto 1980, en Stokholmo, Svedujo

Konstanta adreso: Universala Kongreso de Esperanto, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.
Poŝtekkonto de la Kongreso: n-ro 627337 (nederlanda), aŭ Banko de la Kongreso: Amsterdam-Rotterdam Bank, Rotterdam, n-ro 4209.01.444.

1	<input checked="" type="checkbox"/> Mi aliĝas al la Kongreso laŭ la kondiĉoj presitaj sur la dorsa flanko. Mi sendas la pagon laŭ la apudaj specifaĵoj:	
	(1) <u>pa 14 74 29-5</u> (postmandato) poŝta giro/bankgiro (banko)	
	<input type="checkbox"/> Mi ne povas jam aliĝi pro pasportaj aŭ transpagaj problemoj. Mi promesas pagi tuj post alveno en la kongresejo.	

Kotizo (en kategorio)	250	
Adopta Kaso	25	
Blindula Kaso	10	3
Literatura Kaso	10	
Adoptaj Gepatroj	25	
Bankkostoj	320	
Entute	320	

* Forstrecku la nevalidajn. Pagante internacie per banko aŭ ĉeko, bv. aldoni 5 gld. pro la bankkostoj.